**Redakta Komitato:** D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich, D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
**Ĉefa kaj respondeca redaktoro** Prof. B. Popović, Teknika fakultato, NIŠ, (aŭ Ognjena Price 80, BEOGRAD), Jugoslavio

**Lingva kontrolanto** Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I, BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2 dol. = 25 N. Din
Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkozito 10 steloj)
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE.
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje naučna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Svetosavska 18 Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog naučnog društva esperantista). Za izdavača: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović, (Ognjena Price 80, Beograd)
Štampano u Grafičkom preduzeću »ŠTAMPA«, Sarajevo; za štampariju Simo Bunčić.

# SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 19
N-ro 1 (73)
15. 2. 1968.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25.00 din.

**Enhavo:**

**F. G. Blázquez:** La strukturo de la oracio
**M. E. Falla:** Po-vorta tradukado de esperanto fare de kalkuliloj
**T. Rosinsky-A. Kapusi:** Maljuniĝo de la nerva sistemo
**O. Pancer:** Raciigo de la laboro en agrikulturo kaj hortikulturo
**ISAE-TC:** El la fakoj

415.6 ( = 408.92)

## LA STRUKTURO DE LA ORACIO

**(Felix Garcia Blázquez, Caracas, Venezuelo)**

En la artikolo »Terminologiaj demandoj en Sintakso« (S. R. Vol 18, № 2 (70)) oni pritraktis la nomenklaturon de la parol-elementoj **lokucio, oracio kaj periodo;** sed oni tuŝis apenaŭ supraje la oraci-elementojn. Vicas nun paroli pri ili, pri la nomataj sintaksaj elementoj, nepre antaŭa tasko al la realĝustigo de **la morfologia klasifo de la vortoj** (1).

### Antecedentoj

Ĝenerale la lernolibroj pri Gramatiko ĉe la studo de la oracio lernigas nin ke ĉi tiu konsistas el du fundamentaj partoj: **subjekto** kaj **predikato.**

| | | |
|---|---|---|
| Johano | parolas | (I) |
| subjekto | predikato | |

Ĉi tiu strukturo ne koincidas kun la praktikata de la Logiko, ĉar ĉi tiu scienco dividas la propozicion jene: subjekto, **kopulo** kaj **atributo** (ĉi-lastan kelkiuj nomas **predikato,** kaj aliaj, **predikativo)**

| Leono | estas | besto | |
|---|---|---|---|
| subjekto | kopulo | atributo | (II) |

Tamen en la gramatikaj traktaĵoj oni akceptas — kvankam ne tre ĝenerale — ke kopulo plus atributo integras predikaton.

En anbaŭ ekzemploj de oracio, la subjekto estas reprezentata de substantivo. La unua tipo nomiĝas **predikativa oracio,** pro la fakto enhavi predikaton. kaj siavice ĉilasta parto nomiĝas **verba predikato** pro la verbo kiel ties fundamenta elemento. La oracio respondanta al la dua tipo povas nomiĝi **atributiva,** tial ke la atributo partoformas de ĝi (la kopulo estas flankenlasata ĉar preskaŭ ĉiam ĝian funkcion plenumas la verbo »esti«). Same, ĉar la atributo estas reprezentata per **nomo** (2), estas dirite pri ĉi tiu duatipa oracio, ke ĝi havas **noman predikaton.**

La ĵus skizita estus la minimuma oracio, sed por analizi la avantaĝojn kaj nekonvenaĵojn de tiu struktura divido, ni ekzamenos oracion iom pli elvolvitan.

| subjekto | | predikato | | |
|---|---|---|---|---|
| Multaj | junuloj | studas | medicinon | (III) |
| adjektivo | substantivo | verbo | objekto | |

En ĉi tiu elvolvita oracio, la subjekto estas baze integrita per substantivo komplementita de adjektivo. La predikato estas konsistanta de verbo kaj ties objekta komplemento, ĉilasta reprezentata de substantivo.

En la predikativa oracio, kaj en la atributiva ekzistas alia elemento apudmetita al la predikato: la **cirkonstanca komplemento,** konsistanta en sia plej simpla nuda okazo de la adverbo.

| subjekto | | cirkonstanco | | objekto | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Tiu | kanbo | hodiaŭ | trovis | du | dolarojn | (IV) |
| adj | subst | adv. | verbo | adj | subst. | |

Plie, interne de ĉi tiuj elementoj, kelkiuj diferencigas la ĉefajn elementojn (kernojn) elde la akcesoraj aŭ kompletigaj. Tiel, en la ekzemplo (III) »junuloj« estas kerno de la subjekto, kaj »studas«, de la predikato. En la (IV) »trovis« estas kerno de la predikato, kaj »dolarojn« de la objekto.



**Pravigo de la proponita nomenklaturo**

Evidentas ke tiu anarkio pri la divido de la oracio rezultas neniel didaktika, emas konfuzi konceptojn kaj malfaciligas treege la lernadon kaj retenadon de la gramatikaj reguloj; tial konvenas unuigi kaj simpligi iom pli la nomenklaturon.

Se ni allasas la dumembran oracion paralele kun la trimembra, oni alvenas al la jenaj absurdaĵoj:

a) Ĉar en la predikativa oracio ni havas unuflanke la komplekson »substantivo + adjektivo« fronte al tiu de »verbo + substantivo«, rezultas ke en la subjekto la substantivo estas fundamenta elemento kaj en la predikato, akcesora aŭ kompletiga (vidu ekz. IV).

Konsekvence, por forigi tiun nenormalaĵon oni devas egalniveli ambaŭ tipojn de substantivo inter ili (subjekto kaj objekto). Oni ne povas alporti ambaŭ al la sama nivelo kiel la verbo, ĉar ili devas diferenciĝi de ĉi tiu; nek ankaŭ lasi la verbon malsupre de la substantivo (3). Tial, la oracio restos dividita en tri partojn, el kiuj la verbo estos la ĉefa, t. e. la kerno de la oracio, kaj subordigita al ĝi la aliaj du: subjekto kaj objekto (aŭ subjekto kaj atributo, ĉe atributivaj oracioj).

Ĉar ĝenerale la ordo de la oracio estas: subjekto, verbo kaj objekto aŭ atributo, oni povas nomi la objekton, postverba komplemento aŭ pli mallonge **postverbo;** same la atributo, kvankam nune ĝi ne estas rekonata kiel verba komplemento. Plie, la subjekto, la alia elemento ligata de la verbo, samnivela je la postverbo, povas esti nomata **antaŭverbo,** pro la fakto situi antaŭ la verbo.

b) Ĉe predikativa oracio (ekz. III) la adjektivo plenumas duarangan rolon, kaj ĉe atributiva (ekz. IV) ĝi povas funkcii mem kiel atributo, tiom veras ke kelkaj gramatikistoj asertas ke kiam substantivo konsistas atributon, ĝi plenumas adjektivan funkcion.

Antaŭ ĉi-lasta nekongruaĵo endas ŝanĝi la rolojn kaj konsideri pli ĝuste kiel tipa atributo, la substantivon kaj ne la adjektivon; tial ke per tio oni egalnivelas ĉiujn substantivajn funkciojn (kernoj de la elementoj ligataj de la verbo) kaj unuformigas la akcesoran funkcion kiu devas respondi ĉiam al la adjektivo.

Aldone ni povas konsideri ke ĉe la okazoj kiam la atributo ne havas formale substantivon, oni devas supozi ĝin ĉeestanta en tio. Ekzemple se mi diras:

**Maria estas inteligenta (V)**

oni devas kompreni kiel volvitan atributon »inteligenta knabino« aŭ io simila laŭ la kuntekso. Egale se ni diras:

Neĝo estas blanka (VI)

oni devas subkompreni la vorton »substanco« apudmetitan al la adjektivo »blanka«.

Ofte oni aŭdas ke atributo estas kvalito atribuata al la subjekto. Eble, sed pli ekzakte estas diri ke la adjektivo-atributo referas al substantivo implicita en la postverbo kaj pere de ĉi-lasta ankaŭ al la subjekto.


c) Iom supre ni diris ke ĉiu tipo de oracio povas havi cirkonstancan komplementon, kiu estas konsiderata kiel komplemento de la verbo. Ankaŭ unu el la du postverboj, nome la objekto estas konsiderata verba komplemento, sed ambaŭ funkcioj estas tute malsamaj, kiel ni tuj vidos.

Ĉe la lokigo de la adverbo — unuvorta cirkonstanca komplemento — interne de la oracio, prezentiĝas al ni dilemo: ni ne povas egalniveli la adverbon rilate al la substantivo, tial ke tiu ne povas ekzerci ĉiujn substantivajn funkciojn, ekz., tiun de subjekto. Ankaŭ ĝi ne povas lokiĝi ĉe unu stupo pli malsupre ol tiu de la substantivo, tial ke ni egalnivelus ĝin al la adjektivo, kiu nenion komunan havas kun la adverbo. La adjektivo-atributo, kiel ni ĵus vidas, ne estas komplemento de verbo, sed de implicita substantivo kiu jes estas verba komplemento. Malpliprave ni povas lokigi ĝin malsupren de la adjektivo, ĉar la advebro referiĝas rekte (t. e. senpere de alia vorto) al la verbo.

Sed, se ni analizos pli profunde, ni vidos ke la adverbo estas tre speciala verba komplemento, kaj ĉi tiu specialeco konsistas en tio ke ĝi ne estas nepre necesa por esprimi kompletan oracion (estante ĉi tiu ideo pri »nepra neceseco« iel konvencia, vidu ekzemplojn I, II kaj III kiuj estas kompletaj oracioj). Ĉi tio samsignifas postuli ke oracio estas kompleta kiam ĝi konsistigas almenaŭ subjekton, verbon kaj postverban komplementon (objekto aŭ atributo), kaj ĉio kion oni aldonas al ĉi tiuj elementoj ne estas nepre necesa por la gramatika esprimo de la juĝo. Nu, ne estante nepre necesa la advebro, ĝi ne povas esti komplemento, ĉar komplemento estas tio kio mankas por ke io estu perfekta, kompleta, sen difektoj. Ankaŭ ĝi ne estas superflua, neutila, ripeta, pleonasma, sed male ĝi donas pli grandan precizecon, pli bonan klarigon al la juĝesprimo; kaj al tio kio plenumas ĉi-lastajn kondiĉojn ne decas alia nomo ol **suplemento.** Tial, ĉiu adverbo estas **verba suplemento, kaj** ĝenerale tio kio en klasikaj traktaĵoj nomiĝas cirkonstanca komplemento, ankaŭ devas esti inkluzata en la menciita suplemento.



SKEMO DE LA ORACIO




Noto: Inter krampoj oni indikas la nomon de la elemento kiam ĉi tiu estas unuvorta.

**Resumo**

Oni analizas la klasikan nomenklaturon pri la oraciaj elementoj, kaj rimarkas ties kontraŭdirojn.

Laŭ la proponita nomenklaturo, la oracio — vidu skemon — konsistas el tri fundamentaj elementoj: unue la subjekto aŭ **antaŭverbo**, due la **verbo** mem (kerno de la oracio) kaj fine la **postverbo**, termino kiu inkluzas objekton kaj atributon. Antaŭverboj kaj postverboj estas esence substantivoj aŭ egalvaloraj vortoj. La substantivo kutime troviĝas akompanita de unu aŭ pluraj adjektivoj, sed tiuokaze la kunaĵo »substantivo + adjektivo« havas la saman valoron ol minimumoracia substantivo t. e. antaŭ aŭ postverbon.

Povas ekzisti aliaj akcesoraj komplementoj aŭ **suplementoj**, referitaj al la verbo kiel ekzemple la cirkonstanca, kiu nomiĝas adverbo kiam tiu estas unuvorta.

**Notoj**

(1) Temo de venonta artikolo.

(2) Ĉe la latina gramatiko, »nomo« estas substantivo aŭ adjektivo.

(3) La verbo estas, en la oracio, pli grava elemento ol la substantivo, tial ke tiu povas konsistigi oracion, kio neniuokaze povas fari la substantivo.

**Aparta noto.** En Scienca Revuo Vol. 18 n-ro 2, p. 43, linio 9 devas esti: »ne ĉiu oracio estas propozicio«.